
# Scienco en Esperanto: la akademia koro de la UK en Graz

Amri Wandel

**De la Internacia Kongresa Universitato ĝis la Scienca Kafejo, de la Esperantologia Konferenco ĝis la premioj Pirlot kaj Power: la 111-a Universala Kongreso en Graz montras denove, ke Esperanto estas ne nur lingvo de kulturo kaj amikeco, sed ankaŭ lingvo de scienco.**

Unu el la plej interesaj flankoj de la Universala Kongreso en Graz estis la ampleksa scienca programo. Apud la ĝenerala kongresa programo, la kongresanoj povis partopreni prelegojn kaj diskutojn pri scienco, lingvistiko, teknologio kaj aliaj fakaj temoj.

La ĉefa akademia scenejo estis la Internacia Kongresa Universitato (IKU), kies 79-a sesio okazis kadre de la UK. Dum la solena malfermo, la IKU-rektoro prof. Amri Wandel, kiu dum multaj jaroj servis kiel sekretario de IKU, dankis al siaj posteuloj en la roloj de IKU-sekretario, José Antonio Vergara, kaj de estrarano pri Scienca Agado, François Lo Jacomo. Wandel elstarigis la kunlaboron inter UEA kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kiu dum tridek jaroj multe kontribuis por la disvolvo de la scienca agado en la Esperanto-movado, kaj kulminis en Graz, kie ses IKU-proponoj estis adoptitaj de AIS kiel prelegojn de sia 43-a sesio de la Scienca Universitata Sesio.



Prezento de IKU kaj la scienca programo dum la Malfermo

## IKU: universitato en Esperanto


IKU estas jam delonge unu el la plej prestiĝaj sciencaj programeroj de la Universala Kongreso. Ĝi ne celas profesiajn sciencistojn kaj universitatanojn, sed la kongresanojn. La prelegoj estas interesaj kaj kompreneblaj por klera ĝenerala publiko. Tio estas unu el la grandaj fortoj de IKU: universitata scio estas prezentata rekte en Esperanto.

El la ĉ. tridek proponoj por sciencaj prelegoj la IKU-komisiono rekomendis sep por IKU, ok por Scienca Kafejo kaj ses por Scienca Universitata Sesio de AIS. La temoj ege variis, de astronomio ĝis literaturo, de lingvistiko ĝis filozofio, kaj de esperantologio ĝis ĝardenismo (vidu *Esperanto* 2026:6 p. 128). Fine ne okazis la IKU-prelegoj de Jacobsen kaj Moret, ĉar la prelegantoj ne povis fizike ĉeesti la kongreson, kaj malsame al la pasintaj jaroj, ne estis akceptitaj prezentaĵoj registrite aŭ defore. Tamen, la ceteraj prelegoj okazis kiel planite, ĉefe marde kaj ĵaŭde, en la plena salono Steiner. En tri el la prelegoj okazis AIS-ekzamenoj. En la prelego pri Suneklipsoj (Wandel) estis 40 ekzamenitoj, kiuj dum la Scienca Forumo ricevis krom la tradiciaj AIS-atestiloj ankaŭ eklips-okulvitrojn. Ekzamenoj okazis ankaŭ en la prelegoj pri Elementaj malabundoj: ĉu nesolvebla problemo? (Raola) kaj Filozofioj de Oriento, Okcidento kaj Sudo – pri la valorigo de fonta sperto (Zieba). La ekzamenitoj pri Suneklipsoj, kiuj ne ĉeestis la Sciencan Forumon, povos peti siajn diĝitajn AIS-atestilojn, ĉe *info@ais-sanmarino.org*.


Disdono de IKU-AIS-diplomoj por la ekzameno pri "Suneklipsoj"

## La IKU-libro

La IKU-prelegoj estas dokumentitaj en la *IKU-libro*, kiu ĉiujare aperigas la tekstojn verkitaj de ĉiuj prelegantoj pri siaj diversaj prelegoj. Tiel la scienca laboro dum la kongreso ne malaperas post la fino de la semajno: ĝi fariĝas daŭra parto de la biblioteko de Esperanto-scienco. La *IKU-libro* estas samtempe scienca kolekto, historia dokumento de la kongreso kaj pruvo, ke eblas verki pri multaj kampoj de moderna scienco en Esperanto. La libroj de antaŭaj jaroj estas aĉeteblaj ĉe UEA ankaŭ post la kongresoj. La ĉi-jara *IKU-libro* havas tekstojn de 21 prelegoj, pli ol 300


IKU-prelego de Věra Barandovská-Frank, kiu gajnis la unuan premion Power por la plej bona prelego

paĝojn kaj multajn kolorajn diagramojn kaj bildojn. Dank' al la kvarlingvaj resumoj (inkluzive de la germana) ĝi estas prezentebla ankaŭ al ne-esperantistoj, kiel reklamilo pri la aplikeco de Esperanto en la scienco. Tiel, ekzemple, la IKU-rektoro prezentis la libron al al urba konsilantino, kiu reprezentis la urbestrinon dum la urbestra akcepto.

## La Scienca Kafejo: scienco en pli malstreĉa etoso

Paralele al IKU ekzistas la Scienca Kafejo. Ĝi konsistas el pli mallongaj, proksimume duonhoraj prelegoj, foje kun pli konversacia karaktero ol kutima universitata lekcio. La Scienca Kafejo povas prezenti temojn kiuj ne nepre taŭgas por longa IKU-prelego, sed kiuj meritas esti konigitaj al la kongresa publiko. Ĝi ankaŭ malfermas la pordon al pli vasta rondo de prelegantoj. Dum IKU la nombro de elektitaj prelegoj estas neeviteble limigita; Scienca Kafejo donas plian spacon al interesaj sciencaj kaj fakaj kontribuoj.


Heidi Goes prelegas

## SUS de Akademio Internacia de la Sciencoj

Alia grava parto de la scienca programo en Graz estis la Scienca Universitata Sesio de AIS (SUS). Akademio Internacia de la Sciencoj celas subteni universitatnivelan edukadon kaj internacian sciencan kunlaboron per Esperanto. En Graz, ĝia studsesio (SUS) kompletigis la prelegojn de IKU kaj de la Scienca Kafejo per prelegoj pli akademiaj, foje kun ekzamenoj.

Dank' al la kombino de tiu tri partoj la kongresanoj povis aŭskulti popularajn prelegojn, sekvi pli altnivelan prelegojn, kaj eventuale eĉ trapasi ekzamenon. Esperanto tiel fariĝas ne nur lingvo pri scienco, sed lingvo por fari sciencon kaj por transdoni universitnivelan scion.

## Esperantologio kiel scienca temo

La scienca programo ne limiĝas al natursciencoj. La 48-a Esperantologia Konferenco de CED okazis ĵaŭde, sub la gvido de Bengt-Arne Wickström kaj Klaus Schubert. Ĝia programo estis aparte interesa, rigardinte Esperanton per sciencaj metodoj. Inter la temoj troviĝis la ciferecaj dokumentoj de la Esperanto-Muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, la Biblioteko Hector Hodler, konservado de Esperanto-arkivoj, la Esperanto-Muzeo de Subirats, kaj la dokumentado de historiaj Esperanto-spektakloj.

Aliaj prelegoj traktis lingvan justecon, la diversecon de konstruitaj lingvoj kaj la estontecon de Esperanto. La konferenco tiel montris, ke la studo de Esperanto tuŝas ne nur gramatikon, sed ankaŭ historion, arkivadon, ciferecigon, sociologion kaj lingvopolitikon.

## Pirlot kaj Power: premii sciencajn librojn kaj prelegojn

La scienca programo estis konklude resumita en la Scienca Forumo, dum kiu oni prezentas la diplomojn por la AIS-ekzamenoj kaj la sciencajn premiojn.

La Premio Germain Pirlot estas dediĉita al la plej bonaj sciencaj libroj en Esperanto, aperintaj lastatempe. AIS disdonis ĝin ĉiujare inter 1994-2001, kaj denove ekde 2017. La ĉi-jara juĝkomisiono konsistis el Carlo Minnaja, Bengt-Arne Wickström kaj Carlos Spinola. La unuan lokon gajnis la libro Santeni vian vivradikon de Wang Disheng (eld. 2022), la duan lokon – la IKU-libro de 2026 (Graz) eldonita de Impeto, kaj la trian lokon – Spac-vojaĝado kaj Esplorado: de Sputnik ĝis Webb de A. Wandel (eld. 2025).

La premiitaj libroj rolis ankaŭ en la Aŭkcio: estis aĉetitaj la IKU-libro kun la subskriboj de ĉiuj prelegantoj, kaj la libroj "Spacvojaĝado kaj Esplorado: de Sputnik ĝis Webb" kaj "Astronomio kaj Astrofiziko por Ĉiuj" donacitaj kaj subskribitaj de la aŭtoro, kiuj gajnis respektive ĉi-jare la trian lokon kaj pasintjare la unuan premion Pirlot.

Ekde 2025 ekzistas ankaŭ la Premio Charles Power, destinita al la plej bonaj sciencaj prelegoj. Ĝi havas du kategoriojn: longaj prelegoj, kiel IKU- kaj SUS-prelegoj, kaj mallongaj prelegoj, kiel tiuj de la Scienca Kafejo. La ĵurio konsistis el Ekaterina Bebenina, Ruth Kevess-Cohen, Daniela Power kaj Bengt-Arne Wickström. La premiojn por longa prelego gajnis: 1. Vera Barandovska-Frank, (Panslavismo en Habsburga monarkio) 2. Humphrey Tonkin (Walt Whitman: Poeto de la Nova Usono), kaj 3. Jim Inhong Psikologia valoro de Zamenhof-proverbaro). La premion Power por la mallonga prelego gajnis 1. Peter Balasz (AI-revolucio kaj Esperanto), 2. Heidi Goes (Frua skribita literaturo en lingvoj de la Konga Lingvo-Areto), kaj Joel Fontaine (Ondoj: danĝeroj kaj utiloj).

La du premioj Pirlot kaj Power konsistigas gravan institucion por la Esperanto-scienca komunumo. Pirlot rekonas la skriban sciencan laboron; Power rekonas la buŝan transdonon de scio. Libro kaj prelego estas du flankoj de la sama korpo, esencaj por vivanta scienca kulturo.

La diplomoj de la premioj estis disdonitaj en la Scienca Forumo, fine de kiu okazis publika debato pri la estonteco de la scienca agado en Esperantujo, aparte pri la stagnanta


François Lo Jacomo kun la IKU-libro

Faka Asocio ISAE. Tiurilate Amri Wandel, prezidanto de AIS, rakontis pli la plano revivigi ISAE kaj la *Sciencan Revuon*, kadre de la retejo de AIS, reviziata de la nova AIS-sekretario, Katerina Bebenina, kiu ankaŭ prizorgas la aliĝon de novaj AIS-membroj. Membriĝi estas senkosta, oni nur bezonas sin anonci ĉe *info@ais-sanmarino.org*.

## Scienco kiel parto de la Esperanto-lingva komunumo

La scienca programo de la UK estas multe pli ol serio de prelegoj. Ĝi formas tutan ĉenon: **esploro** → **prelego** → **diskuto** → **libro** → **premio**. IKU donas la grandan akademian scenejon; Scienca Kafejo alportas sciencon al pli neformala publiko; AIS ofertas universitatan profundigon; la Esperantologia Konferenco esploras la lingvon mem; kaj la premioj Pirlot kaj Power montras aprezon al la plej bonaj rezultoj.

Estas bela simboleco en tio, ke ĉio ĉi okazas en la Universala Kongreso de Esperanto. La lingvo, kreita por faciligi internacian komunikadon, dum unu semajno fariĝas instrumento por internacie edukiĝi kaj diskuti pri scienco en multaj, plej diversaj fakoj.